§ Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Decembro : 1 2021

# LAŬ AŬSTRALIA TRIBUNALO, AMASMEDIOJ RESPONDECAS ANKAŬ PRI ALIHOMAJ OPINIOJ, SE ONI DISKONIGAS ILIN

La Supera Tribunalo de Aŭstralio juĝis la pasintan monaton septembron, ke amasmedioj respondecas pri la opinioj de aliaj homoj aperantaj sur siaj *Facebook*-retejoj. Pro la fakto, ke tiuj medioj faciligas la aperon de tiuj opinioj en siaj ret-lokoj, ili agas kiel eldonistoj kaj diskonigantoj de tiuj opinioj.

La aferon iniciatis S-ro Dylan Voller, junulo kiu plendis antaŭ la Supera Tribunalo de Novsudkimrio kontraŭ du amasmedioj, pro la ofendaj opinioj ŝutitaj kontraŭ li. Antaŭe S-ro Voller diskonigis la malbontraktadon suferitan kiam li estis arestita.

La opinioj de la legantoj aperis sur la *Facebook*-retejoj de du gravaj aŭstraliaj ĵurnaloj (*The Sydney Morning Herald* kaj *The Australian*). La leĝaj asistantoj de tiuj medioj deklaris, ke tiuj amasmedioj nur estis la administrantoj de tiuj lokoj, kie aliaj homoj publikigas siajn opiniojn, do, ili ne povas esti konsiderataj kiel la aŭtoroj de tiuj misfamigaj vortoj.




Male, la advokato de la pledanto rimarkigis la fakton, ke tiuj insultoj diskonigitaj de la retejoj endanĝerigas la vivon de S-ro Voller kaj pro tio respondecas tiuj kiuj faciligis la aperon de la fikomentarioj.

Fine, la Tribunalo konsideris en la juĝo, ke la ĵurnaloj *"faciligis, stimulis, do, helpis, la publikigon de tiuj opinioj"*, pro tio ili povas esti konsiderataj *"eldonantoj kaj diskonigantoj de tiuj misfamigoj"*. La leĝo konsideras, ke tiuj kiuj eldonas opiniojn ankaŭ respondecas pri la insultoj enhavataj en tiuj opinioj.

# Vorto de la Semajno

**Absolvi** (tr): Deklari iun senkulpa. Malkondamni.

- *La Tribunalo absolvis la akuziton, do li tuj eliros el la malliberejo.*
- *La juĝisto konsideris, ke la akuzito estas senkulpa pri ŝtelo, tamen li ankaŭ proklamis, ke la akuzito kulpis pri damaĝoj al la konstruaĵo. Do, li ne restis tute absolvita post la juĝo.*



*Hans Fritzsche estis la sola akuzito dum la Nurenbergaj Procesoj kiu fine restis absolvita.*

**Ĉu vi scias, ke oni povas sekvi kurson pri Internacia Mar-Juro en nia ret-loko?**
**Vizitu ĝin: https://www.esperantojuro.org/kursoj/**

